



**Esperantista
Vegetarano
2006**



Esperantista Vegetarano

2006

Organo de TUTMONDA ESPERANTISTA VEGETARANA ASOCIO (TEVA)
Kunlaboranta kun UEA, kaj Membro de IVU kaj EVU
Movado fondita en 1908 - Unua Honora Prezidanto Lev N. Tolstoj

Enhavo

- 1 - **Karegaj**
- 3 - **Du verdaj vojoj: vegetarismo kaj Esperanto**
Kiuj ni estas?
de *L. Rokamoriĉe*
- 7 - **Ekster la nuntempa realaĵo, tamen iam realaĵo**
Aleksandro La Granda
- 10 - **Monologo**
"FOIE GRAS"
de *Luiza Carol*
- 12 - **Arbarego en nia mano**
de *Andreas Flores*
- 15 - **El nia kuirejo**
"La Pizza"
de *Filomena kaj Lilja*
- 19 - **Niaj familiaj aferoj**
 - La Kunsido de TEVA
 - Movada Foiro
 - Nekrologo pri S-ro *William Parrott*
 - Vojaĝante tra libroj
- 30 - **Kulturo**
200 junuloj, Gustavo Dudamel, unu orkestro
- 32 - **Humuraĵoj**
de *Bob Felby*
- 35 - **Lingva angulo**
- 38 - **Elektronika poŝto**
- 39 - **Asociaj informoj**
- 40 - **Kotizoj**

Kovrilo: Nimfeoj - fotis Filomena Canzano

Redaktoroj : William SIMCOCK, Bob FELBY, Mark STEINBERG, Lilia FABRETTO

Poŝta Adreso ĉe: Lilia FABRETTO - Via Pietro Cartoni 12/12 - IT - 00152 ROMA, Italia

Faksimilo: 06 58202232 - Elektronika poŝto: centro.stampa@tiscalinet.it

Presita de Tipolitografia Romagrafik - Via V. Putti 13 - 00152 Roma, Italia

Karegaj,

Floro kiu ekburĝonas estas simbolo de la beleco de la Naturo kaj de juneco. Kiam ni kaptas kaj ĝuas tiun belecon, ĝi plu vivos en ni, kaj ni mem kreos harmonion. Se ni nutros per beleco la junecon, la novaj generacioj ekburĝonos harmonie.

Floroj kaj burĝonoj renoviĝas daŭre sur la Tero, kaj ankaŭ nia movado bezonas renoviĝon kaj novajn fortojn.

Porti mesaĝon eksteren de niaj centroj al tiuj, kiuj ankoraŭ ne konas la du verdajn vojojn, t.e. vegetarismon kaj Esperanton, estas la celo de nia movado. Kaj ĉiu TEVA-an(in)o portas per sia vivmaniero la mesaĝon.

Por pli disvastigi nian lingvon kie oni ankoraŭ ne uzas ĝin, estis lanĉita la MONDA TAGO DE ESPERANTO, la 15an de Decembro, kaj la TAGO ekmovas neantaŭviditajn fortojn kaj ideojn.

Imitinda, inter aliaj, estas la iniciato, kiun nia Rezentanto s-anino Sandra BURGUES ROCA realigis la 15an de Decembro 2005 en Montevideo, Urugvajo (vidu LA LETERO-n de E/V n-ro 21/2006).

Pliaj iniciatoj naskiĝis nun en Urugvajo kaj en aliaj landoj.


Lernejoj atendas E-instruistojn. Kiuj el ni atingis la Superan Nivelon kaj estas pretaj instrui? Kaj la homoj atendas esti informataj pri la avantaĝoj de nia lingvo.

Ni konstatis ke nuntempe ekzistas serioza intereso pri vegetarismo kaj la homoj volas scii pli pri la vegetarana vivmaniero. Multego estas por diri kaj por pruvi.

Ni bezonas pli da spertuloj, kiuj argumentu la valoron de niaj temoj kaj portu ilin profesie en kulturajn kaj sciencajn eventojn.

Tekstoj valoras, sed ili ne sufiĉas. La homoj - viroj kaj virinoj - per si mem portas vivantan mesaĝon al la aliaj homoj, kaj per si mem ili montras kion signifas vegetarismo kaj Esperanto.

Ĉiam antaŭen!



*Du verdaj vojoj:
vegetarismo kaj Esperanto*

Kiuj ni estas ?

de L. Rokamoriĉe

De la pratempoj al la nuntempo

La konscio, ke unu lingvo neŭtrala povas esti laŭnatura ponto inter la aliaj lingvoj, kaj ke la natura nutraĵo de la homo estas la fruktoj, kiujn la tero donas al la vivantaj estaĵoj, ĉerpas ĉe la origino de la homo mem.

En la pratempo la homoj vivadis sur la arboj, kaj kiam de unu arbo al la alia ili volis interkomunikiĝi voĉe, ĉar ili ne havis vortojn, ili uzadis sonojn. Per malsimilaj sonoj, tiu lingvo estis sama al ĉiuj, kiam ili volis voki la idojn, aŭ por atentigi pri manĝo aŭ pri danĝero.

La nutraĵo de la prahomoj estis la fruktoj de la arboj kaj la fruktoj, kiuj kreskadis sur la tero. La fakton ke la prahomo estis fruktomanĝulo, klare montras la studoj de kompara anatomio kaj fiziologio.

Jen kelkaj faktoj:

La natura nutraĵo de la homo kaj de la aliaj animaloj

Por kompreni kia estas la natura nutraĵo de la homo kaj de la aliaj animaloj, oni devas rigardi iliajn organojn, la

digestan aparaton, la dentojn kaj la naturan instinkton de la sensoroj, kiuj ilin gvidas al la elekto de la manĝaĵoj.

La animaloj, kiujn la homo nomas bestoj (kvankam ne ekzistas regno de bestoj, sed nur la **Regno Animala**, kaj estas diferenco inter sovaĝa besto kaj animalo), konservas la laŭnaturajn sensorojn ne difektitaj, kaj aŭtomate ili elektas la manĝaĵojn taŭgajn al ili kaj al la propraj idoj. Kontraŭe la homo, kies sensoroj nun alinaturiĝas ekde la infaneco pro la aktuala teknologia vivmaniero, ne plu povas fidi siajn sensorojn por la elekto de siaj manĝaĵoj, kaj ili devas turni sin al konstanta observado kaj eksperimentado.

**La nutraj organoj de la karnomanĝulo, herbomanĝulo, frukto-
manĝulo, kaj de la homo**

La karnomanĝulo

- **La intesto** de la karnomanĝuloj estas pli mallonga ol tiu de la aliaj animaloj; ĝi havas de trioble ĝis kvinoble la longon de la propra korpo (de la buŝo ĝis la anuso); ĝi estas tiel mallonga por ke ĝi povu digesti la karnon, kaj rapide eligi la putrontajn karnajn skoriojn.
- **La stomako** de la karnomanĝuloj sekrecias multe pli da kloridacido ol tiu de la homa stomako, por pli bone kaj pli rapide digesti la manĝaĵojn. La formo de la stomako estas preskaŭ ronda.
- **La kojnodentoj** (kaninoj) de la karnomanĝulaj mamuloj estas tre pintaj, apartigitaj, longaj, disvolviĝintaj kaj akraj por kapti la rabaĵon, kaj por ŝiri kaj disŝiri la karnon.
La tranĉodentoj (incizivoj), kiuj servas al la distranĉo de la manĝaĵo, estas malmulte disvolviĝintaj.
La molaroj estas pintaj: iliaj respektivaj kuspidoj ne kuntuŝiĝas, sed ili flanke tanĝas por disigi la fibrojn de la karno.

- La ungegoj ĉe la ekstremo de la karnomanĝulaj fingroj estas grandaj kaj akraj.

La herbomanĝulo

- La longo de la **intesto** de la herbomanĝuloj estas de dudekoble ĝis dudekokoble la longo de la korpo; la stomako estas pli granda kaj ĝia strukturo estas kompleksa.
- La **tranĉodontoj** estas tre disvolviĝintaj.
- La **kojnodontoj** (kaninoj) ne estas tre grandaj, kvankam kelkfoje, kiel ekzemple ĉe la elefantoj, ili estas tiel disvolviĝintaj, ke ili iĝas defenda armilo.
- La **molaroj** havas la maĉan surfacon larĝa, kaj ili estas tegitaj per emajlo nur flanke.

La fruktomanĝuloj

- La longo de la **intestoj** de la fruktomanĝuloj estas de dekoble ĝis dekduoble la longo de la korpo.
- La **stomako** estas iom pli granda ol tiu de la karnomanĝuloj, kaj ĝi kontinuas en la duodenon, kiu funkcias kiel dua stomako.
- La **dentoj** havas pli aŭ malpli la saman alton.
- La **kaninoj** estas iomete elstaraj, konusaj kaj malakraj (fakte ilia uzo ne estas por kapti rabaĵon).
- La **molaroj** ne estas akraj kiel tiuj de la karnomanĝuloj; ilia maĉa surfaco estas larĝa, kaj ili estas tegitaj per emajlo por preventi eluziĝon kaŭze de flanka movado.

La homo

- La **mano** de la homo ne havas ungegojn kiel tiuj de la karnomanĝuloj, kaj per sia nuda mano la homo ne povas mortigi animalojn. Per sia mano la homo rikoltas fruktojn,

kaj per ili li nature sin nutras.

- La homo havas nek dentegojn nek pintajn, disvolviĝintajn kaninojn, kiel tiuj de la karnomanĝuloj.
- La **dentoj** de la homo ne povas ŝiri nekuiritan animal-karnon, kaj liaj dentoj servas por mordi kaj maĉi.
- La **intesto** de la homo ne sekrecias fortan gastran sukcon, kiel tiu de la karnomanĝuloj por digesti ĵus kaptitajn predojn, iliajn karnon kaj malmolajn histojn. La homo, antaŭ ol manĝi animalojn, devas atendi ke la karno estu putrinta kaj poste li kuiras ĝin.

La longo de la homa intesto estas ĉirkaŭ sepoble la longo de lia korpo. La homa intesto estas pli longa ol tiu de la karnomanĝuloj, kaj ĝi ne estas taŭga por rapide forigi la karnon, kiu en la intesto de la homo putras kaj kreas malsanojn.

Se ni ekzamenas la ĉi-supran strukturon de la korpo de la homo, lian manon, la dentojn, la digestan aparaton, ni notas ke ili similas nek al tiuj de la karnomanĝuloj nek al tiuj de la herbomanĝuloj, sed ili similas al tiuj de la frukto-manĝuloj, kaj tio montras ke la homo estis nature frukto-manĝulo jam de la komenco de sia tera vivo.

Estas fakto ke en la pratempoj, kiam la vegetalaro spontanee kreskis sur la tero, la homo sin nutris per fruktoj. Poste pro ŝanĝoj de la medio, sekvis glaciigoj, dezertiĝado de la landoj kaj malapero de la vegetalaro. Por travivi, la prahomo armis sin per pintaj silikoj kaj iĝis mortiganto. Hodiaŭ la homo ne plu bezonas mortigi por travivi. Li devas nur mastrumi la grandegajn riĉaĵojn, kiujn la tero sindone disponigas, kaj kiuj sufiĉas por ĉiuj vivantaj estaĵoj sur la tero.



*Ekster la nuntempa realaĵo,
tamen iam realaĵo*

ALEKSANDRO LA GRANDA



En la ĉiutempaj fabeloj de ĉiuj landoj ofte enestas kelkaj veraĵoj. La fama kolekto da arabaj, persaj kaj hindaj popolaj rakontoj kaj fabeloj, konata sub la titoloj "Mil Rakontoj", aŭ "Arabaj Noktoj", aŭ "Mil kaj Unu Noktoj" enhavas, inter aliaj, rakonton pri Aleksandro La Granda (356-323 a.K.).

Unu nokton Shahrazad, la edzino de la Sultano, faris al li la jenan rakonton:

- Dum sia trairado al malproksimaj kaj nekonataj landoj, Aleksandro La Granda malkovris popolon, kiu havis

malmulton por sin nutri kaj posedis nenion. Ĉe la pordoj de la domoj, kie ili vivis, ili havis la sepultejon de la propraj mortintoj, kiun ili zorge senpolvigis, lavis kaj tenis konstante pura. Ili surgenuiĝis antaŭ siaj mortintoj, kaj kun la manoj levitaj al la ĉielo, ili faris adoron al Alaho, la kreinto de ĉiuj vivantaj estaĵoj. Ili manĝis kreskaĵojn kaj fruktojn de la tero. Esprimo de kvieto estis sur la vizaĝo de ĉiuj.

Post kiam Aleksandro La Granda vidis tiun strangan spektaklon, li sendis kurieron al la reĝo de tiu popolo por inviti lin al sia kortego. Sed la reĝo respondis ke li tion ne bezonas. Aleksandro surprizita pro tiu respondo, decidis iri mem al la domo de la reĝo por konstati le veron de la faktoj. Kiam li eniris en la grandan ĉambron de la trono, li diris al la reĝo: "Siro, mi vidas ke vi havas nek oron nek arĝenton nek havaĵojn el la mondo!" Kaj poste li demandis la reĝon: "Kial vi metis la sepultejojn de viaj mortintoj ĉe la pordoj de la domoj, kie vi loĝas?" La reĝo respondis: "Ĉar ni volas havi ilin ĉiam antaŭ niaj okuloj por ke ni memoru konstante la morton, kaj ni ne forgesu la transmondon. Kiam tion ni faras, la amo por la mondumaj aferoj forlasos niajn korojn, kiuj ne deturniĝos de la amo al la Plejaltulo, la kreinto de ĉiuj mondoj".

Post silenta momento, Aleksandro demandis: "Kial vi manĝas kreskaĵojn?" Respondis la reĝo: "Ĉar ni abomenas la fakton ke niaj ventroj iĝu sepultejoj de senkulpaj animaloj, kaj ĉar la plezuro, kiun donas la manĝaĵo ne preterpasas la ezofagon".

Aleksandro mirkonsterniĝis ĉe tio, kion li aŭdis.

La reĝo prenis poste la ostojn de la kranio de homo, kaj li metis ilin antaŭ Aleksandro, dirante: "La posedanto de tiuj ĉi ostoj estis kruela regnestro, kiu premegis siajn regatojn kaj torturis la malfortunulojn. Li dediĉis sian tempon al la amasigo de riĉaĵoj kaj al la akumulado de la ruboj de tiu ĉi

mondo. Iun tagon Alaho forkaptis lian spiriton kaj trenis lin al la mondo de la inferuloj, kie lin bruligis la flamoj de la infero.

Tio estas kio restas el lia kranio.

La reĝo atendis momenton kaj poste metis antaŭ Aleksandro la ostojn de alia kranio, kaj demandis: "Ĉu vi scias al kiu apartenas tiuj ĉi ostoj?". Aleksandro respondis timigita:

"Tiuj ĉi ostoj de kranio apartenas sendube al potenca kaj grandanima reĝo, justa al siaj regatoj, kompatema kaj honesta. Alaho prenis lian animon kaj donis al li loĝejon en sia paradizo kaj kronis lin reĝo de la anĝeloj".

En tiu momento transe de la nuboj blovis vento.

Malrapide la reĝo metis la manon sur la kapon de Aleksandro La Granda, kaj demandis al li: "Ĉu vi kapablas diri, kiu el tiuj kranioj povus esti la via?".

Aleksandro rigardis la reĝon, subite ekploregis, brakumis lin, kaj diris: "Se tion vi deziras, mi partigos kun vi mian regnon, kaj mi donos al vi la oficon de ĉefa veziro". La reĝo respondis: "Ne, mi deziras nenion el tio, kion vi proponis al mi".

Surprizita Aleksandro replikis: "Kial vi forrifuzas mian proponon?".

La reĝo ridetis kaj eksplikis: "Ĉar la homoj estas malamikoj al vi pro viaj riĉaĵoj, dum en mia mizera regno ĉiuj loĝantoj estas miaj veraj amikoj. Mi ne regas kaj mi ne deziras regi ŝtaton. Mi volas posedi nenion en tiu ĉi mondo, kaj mi kontentigas min per tio, kion mi havas".

Aleksandro La Granda etendis la brakojn al la reĝo, brakumis lin kaj kisis lin sur la frunto, poste li foriris, kaj malaperis en la meandroj de la vasta mondo. -



Monologo

“FOIE GRAS”

[prononcu: foa gra]

de Luiza CAROL

- Kristalaj glasoj, oraj teleroj, arĝentaj tranĉiloj, broditaj tablotukoj... nenio estas troa, mi meritas ĉion, mi pagis por tio... Mi perlaboregis mian monon, ĉio tio estas mia rajto... Mi volas akiri de la vivo kiel eble plej multan, plej bonan, plej multekostan kaj kiel eble plej rapide... Mi ĝuegas tiun ĉi momenton, mi ĝuegas tiun ĉi vinglason kiel kapturnigantan muzikon... kaj tiun ĉi porcion de “foie gras” antaŭ mi, kiu estas vera delikataĵo por pladspertuloj... Mi deziras muzikon, mi deziras grandajn, fortajn laŭtparolilojn, mi volas senti la tamburojn en mia kranio kaj en mia sango, por ke ili malhelpu al mi aŭdi la pulson de mia koro... Jes, jes... por ke ili malhelpu al mi aŭdi tiun ĉi vivan taktomezurilon, kiu tiktakas en mia brusto kaj rememorigas al mi pri la tempopasado... Venigu ĵongliston, kaj klaŭnon, kaj fajro-glutanton, kaj dancistinon, kaj kantistinon! Mi volas distraĵon, mi pagis per kontanta mono por tio! Tio estas mia mono, kiun mi tiom malfacile akiris... laborante naŭ horojn ĉiutage... naŭ horojn ĉiutage sidante sub neonlumo, en klimatizita ĉambro... kun mia dorso rigida, miaj okuloj fiksitaj al komputila ekrano! Naŭ horojn ĉiutage sen ĉiellumo, kvankam la vivo estas tiom mallonga... Per kontanta mono mi pagis por ĉio! Mi volas dancistinon, mi volas klaŭnon... Jen! Jen klaŭno! Li havas maskon de anaso, kun larmo pentrita sur lia vango! Li portas plumkostumon kun malpezaj manikoj kiel flugiloj... Ha, ha! Li estas ridinda! Ha, ha! Li estas dika! Kion li diras? Kion li diras? Bonvolu iom mallaŭtigi la muzikon, por ke ni aŭdu la klaŭnon deklami komikan monologon!

.....

- Kio estas tio?! Kial la lumo estas malŝaltata?! Kio okazas al

mi?! Eble mi tro trinkis... Eble mi tro manĝis... Mi ne volas plu, mi ne volas plu... Lasu min... Mi estas nur kompatinda suferanta anaso, mi neniun dolorigis... Kial vi suferegigas min? Kial vi tenas min tiom longe inter muroj? Naŭ horojn ĉiutage sen ĉiellumo, ŝtopata per komputilaj zorgoj... Poste, mi iras hejmen, en mian komputilitan kaĝon... Kaj kiom amasigita estas mia hejmo! Dekoj da televidkanaloj, tri telefonoj, centoj da radiostacioj kaj la interreto eniraĉas tien... Mi sentas tion kiel... egaj tuboj, ĉiu el ili kun ega funelo ĉe unu ekstremaĵo... kaj pere de ili, mi estas daŭre ŝtopmanĝigata per duonbakitaj ideoj... Mi ne havas tempon por aŭdi la pulsojn de mia koro... tiu ĉi viva taktomezurilo, kiu daŭre tiktakas... tiktakas... La tempo de mia vivo iĝas ŝtopita stomako, troplenigita ĝis ĝi krevas pro tro multe da komputilita manĝaĵo... Mi estas ŝtopita, mi estas dikigita, mi estas sufokata... Mi ne havas tempon por promeni kun miaj novelkovitaj idoj kaj por instrui al ili naĝadon, mi ne havas tempon por esti mi mem... Mi glutas mian propran tempon... MI GLUTAS MIN MEM... Mia sangopremo altiĝas, mia hepato grandiĝas... mia hepato ŝanĝas sian formon... Jen, rigardu tiun ĉi hepaton de ŝtopmanĝigita ansero! Tio estas la tiel nomata "foie gras". Ĝi estas tiu aĵo, kiun vi havas nun en via telero, homo! Rigardu min, homo. Trovu unu trankvilan momenton por aŭskulti la pulson de via koro... tiun ĉi intiman pulson, kiun ni ambaŭ konas tiom bone... ĉar ni estas fratoj, ni estas homo kaj anaso, faritaj el la sama argilo...

.....

- *Kion li diras?! Kion li diras?! Kia ŝerco estas tio?! Mi pagis por distraĵo! Mi volas distraĵon! Mi pagis per kontanta mono... Forigu tiun ĉi klaŭnon! Rigardu: la klaŭno demetas sian maskon! Malantaŭ la masko de anaso, troviĝas kapo de anaso! Kaj la anaso rigardas la spegulon! Kaj en la spegulo estas mi!*

ARBAREGO EN NIA MANO

de Andreas Flores



La Persa Zoroastro (VI jarcento a.K.) vidis la tutan universon en malgranda tritika grajno.

La Romana historiisto, natur-esploristo kaj verkisto Plinio La Maljuna (23-79 a.K.) priskribis kiel la Esenoj havis en kaj ekster siaj loĝejoj argilajn ujojn, kie kreskadis ordinaraj herboj aŭ plantoj. Laŭ Plinio tiuj ĉi kreskaĵoj estis uzitaj ne nur por nutrado.

La Esenoj, kiuj havis komunumojn en Palestino, Egiptio kaj en aliaj orientaj landoj, rigardis tiujn ĉi densajn, tre malgrandajn kvazaŭ arbaregojn, kiujn ili kultivadis en la argilaj potoj, kiel la esencon de la tuta kosma ordo. La kunordigo, ĉiuj antaŭkondiĉoj, la utiligado de ĉiuj fontoj de ener-

gio, harmonio kaj scio estas en tiuj ĉi vivantaj herboj, laŭ la Esenoj.

Ekologio mem, asertas N.B. Székely en sia informilo pri Esena biogenia vivmaniero, trovas sian originon en tiu malgranda, kreskanta herbforstego, kie nenio estas malŝparata, sed ĉio estas utiligata, sorbata kaj gardata. Eĉ en la lasta fazo de la vivo, la elementoj de la planto reiras al la tero, kaj ili provizas per mineraloj la estontajn generaciojn de plantoj. Tio estas vivanta ekzemplo de **la rado de la vivo**, kaj la herbforstego estas la senĉesa kreado de la vivo antaŭ niaj okuloj. Ni estas ĉi tie en la centro, fizike ĉi tie, en la centro de ĉiuj teraj kaj kosmaj fortoj. Ni prenas en niajn manojn malgrandan poton kaj niaj manoj, ĉe la radikoj de la herboj, estas en la centro de ĉiuj energioj. Ni tuŝas tiujn energiojn kaj en niaj manoj estas tiu ĉi kosma realaĵo.

Hodiaŭ la homoj ne emas aŭ ne havas tempon filozofiumi. Tamen la plejmulto de la homoj amas zorgi pri sia sano, kaj por resti sanaj aŭ resaniĝi, oni bezonas pozitivajn energiojn.


Pozitivaj energioj koncentriĝas en sanaj plantoj, kiujn la plantoj siavice ricevas per kosma ordo de la suno, de la aero, de la akvo. Kostas neniom la energio, kiun planto donacas al la homo.

Oni povas semi en bona tero sen kemiaĵoj tritikon, kaj ricevi energion de tiu planto per kontakto, dum ĝia kreska fazo.

En potoj ene de la propra loĝejo oni povas semi ĉiaspecajn plantojn, kiuj donas manĝeblajn fruktojn, kiel ekzemple tomatoj; aŭ luzerno, spicajn herbojn kiel petroselo aŭ rosmareno; nemanĝeblajn plantojn kiel sanseviero (*sansieviera*), aŭ tilandsio (*tillandsia*).

En ĉambroj kun kurtenaroj, pentraĵoj, tapiŝoj aŭ tapiŝplankoj, la herbo sanseviero sorbas la malutilajn substancojn, kiuj el ili eliĝas. La herbo tilandsio purigas la aeron de la elektromagnetaj eligoj, kiuj estas en la ĉambro.

Krom sia specifa, propra celo, ĉiu planto, granda aŭ malgranda, donas al ni sian energion. Per delikata tuŝo de nia mano al herbero, aŭ per apogo de nia dorso al sana, juna arbo, ni sentos fluon de energio, kiu trakuras tra nia korpo, kaj atingas nin de fonto mistera, malproksima, nevidebla, netuŝebla, kiu regeneras nian tutan organismon kaj donos al ni novan, freŝan, pozitivan, sanan energion.



(desegnoj el Informilo pri Esena Biogenio de N.N. Székely)

"La pizza"

de Filomena kaj Lilja

La "pizza" (pr. pítca), kiun en Esperanto oni nomas pico, estas itala plado tre konata, rapide kaj facile preparebla, gaje kolora, varia, nutra kaj malmultekosta.

Sur panpaston, kiun oni enforigis, oni povas surmeti ĉiujn deziratajn ingrediencojn, laŭ la propra gusto kaj fantazio, laŭ la sezono kaj la regiono. En ĉiu itala picejo "pizzeria", (pr. pítcería), laŭ la leĝo, devas esti eksponita listo de ĉiuj ingrediencoj, kiujn la picoj enhavas. Tiele oni havas la eblon elekti tion, kion oni deziras.

Eksterlande oni trovas la nomojn de la ingrediencoj de la picoj en la propra lingvo. Se oni vizitas la italan landon, kiu estas la patrino de la "pizza", jen mallonga listo de la plej tipaj picoj kun vegetaraj ingrediencoj en la itala lingvo:

- "pizza bianca" (blanka), la plej simpla blanka pico, farita el *farina* (faruno), *acqua* (akvo), *lievito* (gisto), *sale* (salo), kun surmetita *olio* (oleo). Oni povas aĉeti ĝin ankaŭ ĉe panvendejoj.
- "pizza rossa" (ruĝa), kun *pomodoro* (tomato). Aĉetebla ankaŭ ĉe panvendejoj.
- "pizza con peperoni" kun kapsikoj
- "pizza con carciofi" kun artiŝokoj
- "pizza con cipolle" kun cepoj
- "pizza con patate" kun terpomoj
- "pizza con zucchine" kun kukurbetoj
- "pizza con funghi" kun fungoj
- "pizza con melanzane" kun melongenoj, ktp

"Pizza Margherita"



El ĉiuj picoj eble la plej konata estas la pico "Margherita", sed kial oni nomas ĝin "pizza Margherita" (pr. pítca Margeríta)? La longa en la tempo kaj riĉa en detaloj historio de la picoj rakontas ke en la jaro 1889 la Reĝo de Italio Umberto I kun la Reĝino Margherita somerumis en Napolo (Napoli) en la reĝa palaco Kapodimonto (Capodimonte). La reĝino, kiu aŭdis paroli pri picoj sed neniam manĝis ilin kaj mem ne povis iri al picejoj, invitis la faman napolan piciston Raffaele Esposito al la reĝejo. Tie en la reĝaj kuirejoj Raffaele Esposito kun la helpo de sia edzino Rosa, sperta picistino, preparis plurajn picojn. Sed tiu kun la koloraj ingrediencoj de la itala flago, t.e.: fromaĝo mocarelo (blanka), tomatoj (ruĝa) kaj bazilio (verda), entuziasmigis la reĝinon, kaj ne nur pro patriaaj motivoj. De tiam tiu fama itala pico nomiĝas "pizza Margherita".

Recepto pri la "pizza Margherita"

por 4 personoj

500 g da panpasto

300 g da pulpo de tomato

2 mocareloj (fromaĝo "mozzarella")

3 folioj de origano

1 supkulero da olivoleo

salo

Se oni ne havas tempon prepari mem la panpaston, oni povas aĉeti ĝin jam pretan ĉe la bakejo. Knedu la ŝvelintan panpaston dum kelkaj minutoj, kaj poste metu ĝin en rondan bakpladon oleomitan kaj sternu ĝin per la manoj ĝis la rando de la bakplado. Surmetu pulpon de tomato fadene tranĉitan kaj tranĉitaĵojn de 1 mocarelo, lasante randon de cm 1,5 ĉirkaŭe de ĝi. Aldonu salon kaj olivoleon. Baku en tre varma forno 20 minutojn. 5 minutojn antaŭ ol elfornigi la picon surmetu sur ĝin la alian mocarelon maldike detranĉitan. Kiam la pico estas kuirita, ornamu ĝin per la folioj de origano en la centro de ĝi.



Jen vegana pico nur kun bongustaj kapsikoj kaj tomatoj:



Se oni deziras prepari mem panpaston, jen la recepto:

Recepto pri panpastro por picoj

1 kg	da tritika faruno	2 supkuleroj da olivoleo
25 g	da biergisto	2 kafkuleroj da salo
500 ml	(duono da litro) da varmeta akvo	

1. *Sur knedtabulo miksu farunon, akvon, biergiston kaj la aliajn ingrediencojn;*
2. *Mane prilaboru paston ĝis knedaĵo iĝas glata kaj mola;*
3. *Kovru ĝin per humida tuko kaj lasu ĝin gisti ĝis ĝi duobliĝas;*
4. *Varmigu fornon;*
5. *En ujo, ŝmirita per oleo kaj farunumita, sternu la panpaston.*

Atentu:

- a) *se vi deziras kraketan picon, baku tuj;*
- b) *se vi deziras picon iomete altan kaj molan, lasu ĝin gisti en la ujo ankoraŭ dum unu horo.*

Sekretoj por plibongustigi la picojn:

- *alta temperaturo de la kuirado*
- *ĝusta proporcio inter faruno kaj akvo*
- *ne necesas prilabori multe panpaston; per kuireja "roboto" sufiĉas 3 minutoj;*
- *ŝauma akvo: la mineralaj saloj entenataj en tiu ĉi akvo plibonigas la rezulton de panpasto.*

Ĉiuj picoj estas faritaj el baza pasto knedita el faruno, akvo, gisto kaj salo, kaj sur ĝin oni surmetas la ingrediencojn, kiujn oni preferas.

La veganoj notu ke ofte en restoracioj kaj en picejoj oni metas ankaŭ sur picojn kun simplaj ingrediencoj pecetigitan mocarelan fromaĝon, kiu fandiĝas je la fornovarmo kaj formas malmolan bazon al la aliaj ingrediencoj.

Sur la saman panpaston nevegetaranoj surmetas ankaŭ nevegetarajn ingrediencojn.

Jen kelkaj nevegetaraj ingrediencoj:

alici (anĉovoj), *cozze* (mituloj), *pancetta affumicata* (fumaĵita duongrasa lardo), *prosciutto* (ŝinko), *salame* (salamo), *salsicce* (kolbasetoj), *scampi* (salikokoj), *strutto* (fandita porkgraso), *von-gole* (venusmituloj), ktp.

Niaj familiaj aferoj



La lilio, blazonŝildo
de la urbo Florenco

La Kunsido de TEVA en Florenco


En la itala urbo de la lilio, bela, arta, historia Florenco, okazis la 91-a UK (29 Julio - 5 Aŭgusto 2006). Ĝoja festo estis renkonti la samideanojn kaj ekkoni novajn amikojn!

Kadre de la UK, TEVA kunsidis la 4-an de Aŭgusto en la salono *Grazzini*. La ĉeestantoj estis 65 el Aŭstrio (1), Belgio (4), Brazilo (5), Bulgario (2), Ĉeĥio (2), Danlando (8), Francio (4), Hispanio (3), Irlando (1), Israelo (3), Italio (12), Litovio (1), Hungario (4), Nederlando (1), Pollando (3), Portugalio (1), Svedio (6), Svislando (2), Ukrainio (1), Usono (1).

La Prezidanto de TEVA, s-ro *Christopher Fettes*, post varma saluto al la ĉeestantoj, parolis pri niaj asociaj aferoj. Li dankis ĉiujn TEVA-anojn, kiuj aktive kunlaboras. Li memoriĝis la Hon. Kasiston s-ron *William Parrott*, kiu forpasis la 19-an de Decembro 2005 en Britujo. Lia nekrologo aperas en la sekvaj paĝoj. Estis senditaj nome de la TEVA-anoj bondeziroj al la Vicprezidanto s-ro *William Simcock*, kiu ne povis veni al nia Kunveno pro personaj problemoj.

S-ro *Fettes* urĝis la membrojn disvastigi Esperanton ankaŭ ene de la vegetaranaj asocioj en la propraj landoj. Li rememoris kiam la aktualaj membroj de la Estraro unue renkontiĝis, antaŭ pluraj jaroj, dum internacia kongreso de IVU (*International Vegetarian Union*), kaj kiom evidenta estis la bezono de nia lingvo dum tiu kongreso. La bezono de neŭtrala, internacia lingvo pli kaj pli kreskas hodiaŭ.

Kunsido de TEVA - Florenco, 4-an de Aŭgusto 2006



La Presidanto de TEVA S-ro Christopher Fettes legas la financan raporton



**Maldekstre: S-ro Fettes montras la kajeron
ESPERANTISTA VEGETARANO
Dekstre: S-ano Francesco Maurelli**





Francesco montras la fotojn de la Festo de la Vegetaranoi en Romo



... kaj respondas al la demandoj



Maldekstre: S-ano Rob Moerbeek parolas pri la muta, nekonata suferado de la fiŝoj



Ĉeestantoj la Kunsidon de TEVA



(fotis Filomena)

Kiel aktuala Kasisto, s-ro *Fettes* petis la membrojn ne forgesi kotizi, ĉar nia financa situacio bezonas urĝan nutraĵon. Fakte la solaj vivrimedoj de nia Asocio estas la kotizoj de la membroj. Nia informmaterialo kostas, sed ĝi devas esti bone farita kaj samtempe alloga. Ni ricevis konsenton de la membroj, de kiuj ni petis per la LETERO de E/V n-ro 21/2006 ilian opinion pri nia informmaterialo. Ni bezonas pli da materialo pri vegetarismo kaj pri nia lingvo.

TEVA aperas en diversaj interretaj ejoj, sed ni devas plilarĝigi nian ĉeeston, kaj doni pli da informoj. S-ano *Ulrich Matthias* publikigis detalan kaj bone faritan artikolon pri TEVA en la reta enciklopedio Vikipedio (<http://eo.wikipedia.org/wiki/TEVA>). Parenteze, tio, kion oni publikigis en Vikipedio pri vegetarismo povus esti blibonigita.

Prenis la parolon poste s-ano *Francesco Maurelli*, kiu montris la fotografaĵojn de la Jara Nacia Itala Festo de la Vegetaranoj, kiu okazis en Romo la 7-an de Majo 2006 sur la placo *Re di Roma*. En tiu okazo *Francesco* prezentis al la ĉeestantoj la temon: "Vegetarismo kaj Esperanto: du verdaj vojoj kaj unu celo: respekto al ĉiuj vivantaj estaĵoj, kaj al la medio, al ĉiuj lingvoj kaj al ĉiuj kulturoj", - **celo, kiu portas al la paco.** -

Sekvis demandoj kaj respondoj kaj fine la Prezidanto s-ro *Christopher Fettes* dankis la partoprenantojn kaj kun elkora ĝis revido fermis la Kunsidon.

Kadre de la UK en Florenco okazis ankaŭ la MOVADA FOIRO sur la herbejo ekster la kongresejo la 29-an de Julio. TEVA havis tablon kaj tabulon. Ni kontaktis la vizitantojn kaj disvastigis al la interesatoj nian informmaterialon. La asocioj kiuj eksponis sian informmaterialon estis 70. Multaj estis la vizitantoj kaj la FOIRO ricevis sukceson.



*En
Florenco
dum
la
MOVADA
FOIRO
la
29-an
de
Julio
2006,
la
tablo
kaj
la
tabulo
de
TEVA
kun
informa
materialo
pri
vegetarismo*



(fotis Lilja)



Nekrologo

S-ro William Parrott, Hon. Kasisto de TEVA (1922-2005)



S-ro *William Parrott*, Vilĉjo por la samideanoj, lernis Esperanton kiel mezaĝulo kaj, tipe, li tuj deziris ne nur amuziĝi sed ankaŭ per ĝi fari ion utilan. Ĉar li estis bankisto profesie, li afable proponis utiligi siajn spertojn por helpi TEVA-n (Li jam estis honorofica Kasisto de *International Vegetarian Union* (Internacia Vegetarana Unio)).

Nur kiam li eksciis dum sia okdeka jaro, ke li estas mortanta pro nekuracebla malsano, li decidis forlasi tiun valoran, senpagan laboron.

Vilĉjo *Parrott* naskiĝis en *Bedford*, Britujo, la 10-an de Julio 1922. Tuj post la dua mondmilito, dum kiu li servis en la brita mararmeo, komenciĝis lia feliĉa geedzeco, kiu daŭris sesdek jarojn; kiam mortis la edzino *Eunice*, nur kelkajn monatojn antaŭ li, li aranĝis la plantadon de 60 arboj por festi tiujn feliĉajn jarojn.

Multaj estis liaj interesoj. Krom esti kompetenta fotisto, abstinulo, longtempa vegetarano kaj bestprotektanto, li trovis tempon ankaŭ por esti aktiva membro de la Verda Partio, ludi kriketon, ĝui popoldancon kaj esti spertulo pri sonorilologio. Malgraŭ tiom da kompetentecoj li estis homo humila, amata de ĉiuj kiuj konis lin.

Vilĉjo forpasis la 19an de decembro 2005 en *Exmouth*, Britio.

Christopher Fettes



Mi havis la honoron kaj la plezuron labori en la Estraro de TEVA kun s-ro *William Parrott* de la jaro 1990 ĝis la lastaj tagoj de lia ĉeesto en nia Asocio.

En la laboro, lia menso estis matematika, lia penso estis pozitiva kaj klara, kaj lia agado estis praktika, preciza kaj rapida. Ni ne havis en la komenco elektronikan poŝton, sed liaj respondoj al miaj leteroj estis ĉiam per revenanta poŝto kaj per du aŭ tri koncizaj frazoj. La laboro fluadis sen obstakloj, kaj kiam problemo aperis, li simple solvis ĝin.

S-ro *Parrott* estis honesta homo. Li estis homo, kiu lasis ĉion kion li tuŝis, pli bona ol ĝi estis antaŭe.

Lilia Fabretto



Ni ne forgesu la homojn, kiuj honoris nian movadon

Ni faru liston de biografioj de homoj - viroj kaj virinoj -, kiuj honoris nian movadon de la jaro 1908, kiam ĝi naskiĝis, ĝis hodiaŭ.

Se vi havas nomojn, informojn kaj fotojn de rimarkindaj esperantistaj vegetaranoj, bonvolu sendi ilin al la Sekretariejo.



Vojaĝante tra libroj

GVIDLIBRO PRI FLORENCO - tradukis *Pier Vittorio Orlandini*
- Grosseto 2006 - 279 paĝoj - eŭroj 22,50

Al la samideanoj kiuj amas artaĵojn kaj ne povis ĉeesti la UK-on en Italujo aŭ ne povis viziti ĉiujn belaĵojn de la kongresa urbo Florenco, la GVIDLIBRO PRI FLORENCO estas nepra.

S-ano *Pier Vittorio Orlandini* tradukis tiun ĉi libron en Esperanton el gvidlibroj de Itala Turisma Klubo (TCI) kaj aldonis 50 paĝojn kun koloraj fotoj. Legante la historion de tiu ĉi urbo kaj rigardante la artajn reproduktaĵojn, oni ĝuas ilin kvazaŭ oni estus tie.

Pliajn librojn s-ano *Orlandini* tradukis en Esperanton pri la itala regiono Toskanio: *GROSSETO KAJ PROKSIMAĴOJ*, kaj *MAREMO DE GROSSETO* (urboj, urbetoj, vilaĝoj kaj aliaj lokoj en la provinco de *Grosseto*), kiu enhavas ankaŭ receptojn de loka kuirarto (ne vegetara).

"VEGAN PASSPORT"

The Vegan Society - info@vegansociety.com - cm 10x15 - paĝ. 76 - £ 3.99 Eldono 2005

En 2005 aperis la dua eldono de la Vegana Pasporto (*Vegan Passport*) en 56 lingvoj inkluzive de Esperanto. Ĝi estas praktika helpilo ne nur por veganoj, sed ankaŭ por vegetaranoj, kiuj vojaĝas kaj deziras trovi eksterlande senviandajn manĝaĵojn. Kelkaj lingvaj eraretoj en la diversaj lingvoj kaj en Esperanto estos korektitaj, per la helpo ankaŭ de la TEVA-anoj, por la venonta eldono de la Vegana Pasporto.

Inter informmaterialo, kaj ekzempleroj de ESPERANTISTA VEGETARANO, kiujn ni havis sur nia tablo dum la MOVADA FOIRO en Florenco, ni prezentis la verkon "LA RIVOLUZIONE VEGETARIANA" (La Vegetarana Revolucio), kaj "IL LIBRO DI CUCINA AMICO DEGLI ANIMALI" (La Kuireja Libro Amika al la Animaloj).

LA RIVOLUZIONE VEGETARIANA"

"LA RIVOLUZIONE VEGETARIANA" (La Vegetarana Revolucio) de Giorgio Cerquetti - Edizioni Il Punto d'Incontro - Via Zamenhof 685 - 36100 Vicenza, Italia - paĝoj 229 - eŭroj 11,90. Itala eldono.

"Mangiare bene per vivere meglio" (Bone manĝi por pli bone vivi) diras la aŭtoro Giorgio Cerquetti sur la frontpaĝo de sia verko "La Vegetarana Revolucio". Kun simpla, larĝmensa vidado al vegetarismo kaj kun pozitiva, libera sento al la vivo, li brakumas plurajn temojn, kaj malsimilajn homojn en sia libro. Tiu ĉi eldono, kiu aperas en la itala lingvo, ankoraŭ ne estas tradukita en Esperanto. Ĝi enhavas 100 receptojn originale verkitajn de tre konataj vegetaranoj. Estas inde legi kaj disvastigi tiun ĉi verkon, kaj - kial ne? - ankaŭ traduki ĝin en Esperanton.

IL LIBRO DI CUCINA AMICO DEGLI ANIMALI"

Ekzemplerojn de la belega libro "Il libro di cucina amico degli animali" (La kuireja libro amika al la animaloj) eldonita en la itala, germana, franca kaj slovena lingvoj, kun allogaj vegetaraj receptoj kaj belegaj koloraj fotoj, ni same prezentis, kiel dirite, dum la MOVADA FOIRO. Recenzon jam aperis en E/V detale.

“Vivo de Zamenhof” de Edmond Privat

Antaŭ kelkaj jaroj ni sendis al la Membroj ekzempleron de la originala, klasika verko de *Edmond Privat* “Vivo de Zamenhof”, kiu estas tre ŝatata. Nuntempe tiu ĉi verko estas preskaŭ netrovebla. Ĉe la Libroservo de UEA ĝi estas elĉerpita kaj reeldono ne estas antaŭvidita. Ĉe la Libroservo de SAT ĝi estas por vendo. Ni havas ankoraŭ kelkajn ekzemplerojn de tiu ĉi grava verko, je dispono de la Membroj, ĝis elĉerpiĝo de nia stoko.

La poŝa “Fundamento” malaperis

En la Antaŭparolo de la “Fundamento”, L. Zamenhof asertas ke la “Fundamento de Esperanto” devas troviĝi en la manoj de ĉiu esperantisto kiel konstanta kontrolilo, kiu gardos lin de deflankiĝado de la vojo de unueco. Dum la pasinta jarcento aperis pluraj eldonoj de la “Fundamento” ankaŭ en poŝa formato, praktikaj, bone presitaj kaj malmultekostaj, kaj naciaj eldonoj de la kvinlingva Fundamento kun traduko en lokaj lingvoj. Kia estas nuntempe la situacio en via lando? Ĉu la “Fundamento” estas havebla por la lernantoj en normala formato, kaj poŝa, bone presita kaj malmultekosta? Ĉu viaj lernantoj scias ke ekzistas la “Fundamento”?

La verda kalendareto de TEVA

La samideanoj, kiuj deziras la muran, verdan kalendareton de TEVA (cm 15x21) por la jaroj 2007/2008, petu ĝin de la Sekretariejo.

Kulturo

200 junuloj Gustavo Dudamel unu simfonia orkestro

Kiam utopio iĝas realaĵo

3000 ĉeestantoj plenplenigas la koncertejon ĉe la Parko de la Muziko en Romo, la 14an de Septembro 2006.

En la granda silento, momenton antaŭ la starto de la unua peco de la muzika programo, t.e. la Uverturo el *Egmont* de *Ludwig van Beethoven*, renoviĝas la spektaklo de revo, kiu iĝas realaĵo. Oni sentas palpebla la ĝojigan, puran forton de la 25-jaraĝa direktanto de la nacia Venezuelana Junulara Orkestro "*Simón Bolívar*" kaj de la 200 junaj orkestranoj.

La Junulara kaj Infana Orkestra Sistemo

José Antonio Abreu havis revon. Li estis en Venezuelo Ministro de Kulturo, kiam en tiu lando kulturo kaj arto estis privilegio de elito. Li estis en kontakto kun kulturaj homoj en pluraj landoj. Lia revo estis doni kulturon al ĉiuj homoj, al ĉiuj junuloj, al ĉiuj infanoj en la tuta mondo. "La aliro al kulturo kaj al arto devus esti libera kaj malfermita al ĉiuj, precipe en malriĉaj landoj kiel Venezuelo, kie malriĉeco estas multega", diras *José Antonio Abreu*, kaj li aldonas: "Oni povas batali kontraŭ malriĉeco ankaŭ per kulturo".

En 1974 en Venezuelo ekzistis du simfoniaj orkestroj, t.e. la Simfonia Venezuelana kaj la Simfonia *Zulia*. La 12an de Februaro 1975 *José Antonio Abreu* fondas en Venezuelo la Junularan kaj Infanan Orkestran Sistemon *FESNOJV* (*Fundación del Estado para el Sistema Nacional de las Orquestas Juveniles e Infantiles de Venezuela*).

Nuntempe Venezuelo, kun 24 milionoj da loĝantoj, havas 135 junularajn orkestrojn, 75 infanajn kaj 30 profesiajn.

De la jaro 1975, la politika situacio multe ŝanĝiĝis en Venezuelo, sed ĉiuj ŝtatestroj el diversaj politikaj partioj donis ĉiam ŝtatan apogon al la Sistemo; kaj danke al tiu ĉi Sistemo, kreiĝis simfonia orkestra reto en la tuta Latinameriko.



Gustavo Dudamel



José A. Abreu



Claudio Abbado



Orkestranoj

Finiĝas per la lastaj notoj la ludado de la Uverturo el *Egmont* de *Beethoven* kaj eksplodas entuziasma aplaŭdado de la aŭskultantoj al la direktanto *Gustavo Dudamel* kaj al la 200 junaj orkestranoj. Post la kutima, rita paŭzo, la orkestro ekludas la Kvinan Simfonion de *Ludwig van Beethoven*.

De la strato al laboro

La aĝo de la orkestranoj estas de 12 ĝis 27 jaroj. *José Antonio Abreu* kolektas ilin el malriĉaj stratoj kaj el suburboj malbonfamaj, kie knaboj vivas per ŝtelado, sin narkotas, sinprostituas kaj lernas uzi armilojn; kaj anstataŭ narkotaĵojn kaj armilojn, li instruas al ili uzi muzikajn instrumentojn. Ili serioze kaj discipline dum jaroj lernas muzikon, kaj la rezulto de la ludado de tiuj ĉi geknaboj en la orkestro "*Simón Bolívar*" estas nekredebla. Ili laboras konstante sub la instruado kaj la kuraĝigo de *José Antonio Abreu*, de *Gustavo Dudamel* kaj de la fama direktanto *Claudio Abbado*, kiu ofte direktas la koncertojn de la junularaj orkestroj kaj ĉiam senpage.

La Kvina Simfonio de *Beethoven* atingas brile la finajn notojn, kaj reeksplodas la entuziasmo de la aŭskultantoj, kiuj varmege aplaŭdas kaj aplaŭdas.

Gustavo Dudamel ne estas idolo, kaj li ne volas esti idoligita, sed li kaj liaj junuloj estas feliĉaj kaj ĝojaj.

La dua parto de la koncerto estas dediĉita al popola muziko de Latinameriko. La junuloj sentas tiun ĉi popolan muzikon en sia koro: dancante ili ludas kaj kantas, levas la muzikajn instrumentojn, kaj kuntrenas la spektantojn en la koncertejo ĉe la Parko de la Muziko en Romo, en triumfo de sonoj, kantoj kaj ĝojo.

Humuraĵoj

de Bob Felby

Veturis vagonare patro kaj filo. Estis somero, kaj la fenestro estis malfermita. Decidis la patro iom ŝercadi kun sia knabo, kaj li kaŝis lian ĉapon malantaŭ sia dorso. Kiam la knabo demandis: "Kie en la mondo estas mia ĉapo?", la patro diris:

"Ĝi flugis el la fenestro pro la vento, sed se vi fermas viajn okulojn, kaj fajfas, ĝi eble revenos". Fermis siajn okulojn la knabo fajfante pli kaj pli laŭte, kaj la patro surmetis sur lian kapon la ĉapon.

Iomete poste la knabo prenis la ĉapon de la patro, kaj ĵetis ĝin el la fenestro kriante:

"Fajfu, paĉjo, fajfu!"



"Kial kunikloj fartas tiom bone?"

"Ĉar ili estas tiom multaj".

"Kial ili estas tiom multaj?"

"Ĉar ili fartas tiom bone".



La unua vagabondo al alia: "Diru al mi, Rudolfo, ĉu vi iam premis al la reĝino la manon?"

Alia vagabondo al la unua: "Ne, Valentino, ĉu ŝi fanfaronas pri tio?"



Malgranda Eileen retrovenas el la lernejo:

"Hodiaŭ ni bakis kukojn en la lerneja kuirejo".

"Nu", respondis la patrino, "ĉu estis permesite al vi manĝi ilin?"

“Ĉu permesite? Ni devis!”



“Ĉu vi ofte parolas dum vi dormas, Trevor?”

“Ne, sed mi parolas kiam aliaj dormas”.

“Ĉu vere?”

“Jes, mi estas instruisto de Esperanto!”



“S-ro direktoro, mi aŭdis, ke vi serĉas kasiston”.

“Jes, fakte mi serĉas du, la malnovan kaj novan!”



Jonas la forĝisto estis ne ekscitiĝema. Iun tagon vizitis lin leĝisto.

“Por vi mi havas bonajn, eĉ bonegajn novaĵojn”, li diris. “Unu el viaj onkloj en Usono mortis testamentinte al vi ĉiun sian havaĵon, grandegan bienon en Teksaso, du milionojn da dolaroj kaj hundon.

Jonas sidis tute senmove unu momenton. Tiam li demandis: “Al kiu raso apartenas la hundo?”



Diras la dolĉa edzino: “S-ro Jensen ĉiun matenon kisas sian edzinon antaŭ ol li iras laborejen. Kial vi ne faras same?”

“Ĉu vi estas freneza? Mi apenaŭ konas ŝin!”



Eta Jonatano kunmanĝis kun siaj gepatroj en restoracio. Lia patrino estas virino tre ŝparema, kaj manĝinte ŝi petis la kelneron enmeti la manĝaĵrestaĵojn en papersaketon, “por ke ankaŭ mia hundo satmanĝu!”

“Hura!” ekkrias Jonaĉjo “Mi ricevos hundon!”



Riĉega angla vidvino malsanas. Nur sangotransigo povas savi ŝin. En la lasta minuto oni trovas skoton, kies sangotipo kongruas kun tiu de la vidvino. Li donas kelkajn litrojn da sango tiele savante ŝian vivon. Ŝi tre dankeme donas al li 100 pundojn.

Iom poste la vidvino refoje malsanas kaj bezonas ankoraŭ unu sangotransigon. Refoje venas la skoto, kaj ĉio estas bona. Li ricevis 50 pundojn pro sia helpo.

Trian fojon li devis helpi savi ŝian vivon, kaj feliĉe ankaŭ tiun fojon li sukcesis.

Kompreneble la vidvino estis tre dankema, sed nun estis en ŝiaj vejnoj tiom da skota sango, ke ŝi nur manpremis lin dirante: "Elkoran dankegon pro via helpo!"



Iu viro, sudaŭstraliano, ferias en la kamparo. Je sia surprizo li vidas viron, kiu sidas alte en arbo kriante tiom laŭtege kiom liaj pulmoj nur permesas.

"Kion en la mondo vi faras tiom alte en la arbo?", sci-voleme demandas la sud-aŭstraliano.

"Mi forpelas la leonojn", respondas la viro.

"Ĉu leonojn, sed estas neniuj leonoj ĉi tie", diras la sud-aŭstraliano.

"Ne, kompreneble ne, ĉar mi ja forpelas ilin!"



"Ĉu vi povas melki kaj veturigi traktoron?" demandis bienposedanto la junulon serĉanta laboron.

"Mi povas veturigi ĝin, sed ĝis nun mi neniam provis melki ĝin!"

Lingva angulo

LAZARO LUDOVIKO

LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF havis filon, kies nomo estis *Adamo*. *Adamo* kaj lia edzino *Wanda FRENKEL* sia-vice havis filon, kies nomo estis *Ludwik*. Do *Ludwik* estas la nomo de la nepo de L.L.Z..

L.L.Z. naskiĝis la 15-an de Decembro 1859 en la tiama *Bjelostok*, kiu apartenis al la rusa gubernio *Grodno* (nuntempe la nomo de la urbo estas *Białystok*, kaj ĝi apartenas al Pollando). Laŭ la naskiĝa dokumento de L.L.Z., lia persona nomo estas *Lejzer*.

Post kiam li iniciatis la disvastigadon de la Internacia Lingvo, li aldonis al sia unua persona nomo esperantigita *Lazaro*, la duan *Ludoviko*.

La uzado de liaj personaj nomoj esperantigitaj, ankaŭ kiam oni mencias nian *Majstron* en naciaj paroladoj aŭ verkoj, estas en si mem praktika E-mesaĝo, ĉar uzante ĝuste la nomojn, oni uzas la lingvon.

Atentu: "krom" esprimas nur apartigon

L.L. Zamenhof klarigas en siaj *Lingvaj Respondoj* (n-ro 32, *La Revuo*, 1908, Majo) ke "krom" per si mem esprimas nek escepton, nek aldonon, ĝi esprimas nur apartigon; sed ĉu tiu apartigo estas farata por ion forigi, aŭ kontraŭe, por ĝin pli akcenti, tion montras la senco de la frazo mem. Kompreneble, la vorto "krom" povas iufoje kaŭzi neprecizecon aŭ malkompreniĝon; en tiaj okazoj ni devas eviti la vorton "krom" kaj uzi anstataŭ ĝi la pli precizajn esprimojn:

- mi manĝas ĉiujn manĝeblajn kreskaĵojn escepte de faboj
- mi kunlaboras kun ĉiuj escepte de malhonestaj homoj
- mi kunlaboras kun ĉiuj kaj ankaŭ kun eksterlandanoj
- li pardonis al ĉiuj, escepte de sia frato
- ne sole li ĉeestis, sed ankaŭ liaj fratinoj
- mi diris al vi nenion alian ol la plej puran veron

“Esperanto” per komenca litero majuskla kaj minuskla

Kiam nacia lingvo havas la nomojn de la propra kaj de la aliaj lingvoj per komenca litero majuskla, ankaŭ Esperanto en tiu lingvo havas la komencan literon majuskla.

Ekzemple en la angla: *English and the Esperanto language*.

Se la komenca litero estas minuskla, ankaŭ Esperanto sekvas la saman regulon.

Ekzemple en la itala: *la lingua italiana e l'esperanto*.

Esperanto estas lingvo kiel ĉiuj aliaj, kiu sekvas la regulojn kiel la aliaj lingvoj.

En Esperantujo “Esperanto” estas persona nomo (D-ro Esperanto), kaj ĝi konservas la komencan literon majuskla kaj en sia substantiva formo kaj en la finaĵaj derivaĵoj:

- Traduki en Esperanton
- Paroli Esperante
- Esperanta traduko

La sufiksaj derivaĵoj ricevas la minusklon:

- esperantisto
- esperantismo
- esperantigi, ktp.

Lingvaj kuriozaĵoj

La longa irado de la itala vorto "ciao" (pr. ĉào)

Antaŭ la politika unuiĝo, sur la itala duoninsulo ekzistis inter aliaj regnoj kaj respublikoj, la Respubliko Venecio (*Repubblica di Venezia*), kies dialekto havis la rangon de lingvo, ĉar ĉiuj oficialaj dokumentoj de la respubliko estis skribitaj en tiu lingvo.

En la jaroj 1700 ankaŭ la lingvaj esprimoj respegulis la tiutempajn kutimojn, kiuj en Eŭropo estis tre submetiĝemaj kaj riverencegaj. En la itala urbo Venecio (*Venezia*) ekzemple la homoj kutimis klinsaluti dirante: "s'c(i)avo" (pr. sĉàvo).

En la lingvo (aŭ dialekto) venecia la vorto "s'c(i)avo" signifas "sklavo", kaj ĝi estas la lasta vorto de submetiĝemaj esprimoj kun la signifo de "mi estas je via servo, mi estas via servisto, via sklavo".

Kun la forpaso de la tempo ankaŭ la vortoj eluziĝas, kaj "s'c(i)avo" (pr. sĉàvo) perdis la literojn "s" kaj "v", kaj la vorto simpliĝis al "ciao" (pr. ĉào).

De Venecio "ciao" vojaĝis en la tempo kaj tra la tuta itala duoninsulo, kaj nuntempe ĝi estas la ĉiutaga, kutima itala saluto de nordo al sudo, de ŭesto al eosto de la itala lando.

- P.S. La ĉi-supra venecia vorto "s'c(i)avo", ne rilatas al la vorto "slavo", kiu estas ano de Eŭropa popolo. En Aŭstrio oni uzas la vorton "Servus" (latine por "sklavo, servisto") en precize la sama situacio, kiel "ciao".

ELEKTRONIKA POŝTO

Ĉi-sube estas la adresoj de elektronika poŝto de kelkaj TEVA-anoj:

- Onei **BORACINI**, Brazilo: **boracini@yahoo.com.br**
- Sandra **BURGUES ROCA**, Urugvajo: **sburgues@fmed.edu.uy**
- Martín **BUSTÍN Benito**, Hispanujo: **esperanto.marteno@ctv.es**
- Luiza **CAROL**, Israelo: **luizac@012.net.it**
- Bronislav **CHUPIN**, Ruslando: **kiraso@udmnet.ru**
- Bob **FELBY**, Aŭstralio: **esperantobob@iprimus.com.au**
- Christopher **FETTES**, Irlando: **bloomfettes@eircom.net**
- **GBEGLO** Koffi, Togo: **gbko@uea.org**
- Paola **GIOMMONI**, Italujo: **paogiommm@tin.it**
- Ejnar **HJORTH**, Danlando: **ehjo@uea.org**
- Konstantin **HLYZOV**, Ruslando: **kostik@ikso.net**
- Tatjana **KUNICINA**, Ruslando: **lora_honda@mail.ru**
- Nguyễn Dinh **LONG**, Vjetnamo: **long_ngd@yahoo.com**
- Zlata **NANIC'**, Kroatujo: **zlata.nanic@zg.htnet.hr**
- Jozsef **NÉMETH**, Hungarujo: **jozefo_nemeth@hotmail.com**
- Chamberline **NGUEFAK ZEDONG**, Kamerunio: **nzchamberline2000@yahoo.fr**
- Pascal **ROUILLARD**, Francujo: **pascal.rouillard@laposte.net**
- Yoshinori **SAITO**, Japanujo: **kubu@vc-net.ne.jp**
- Roberto **SARTOR**, Argentino: **esperanto@fibertel.com.ar**
- William **SIMCOCK**, Britujo: **WHSimcock@aol.com**
- Antoni P. **TABACKI**, Pollando: **tabacki@wp.pl**
- TEVA - Sekretariejo p/a Lilia **FABRETTO**, Italujo: **centro.stampa@tiscalinet.it** aŭ **teva@ivu.org**

En komputiloj ekipitaj per unikodaj tiparoj troviĝas la supersignitaj literoj de Esperanto.

Ĉu vi kaj viaj korespondantoj havas komputilon kun la supersignitaj literoj de nia lingvo?

Al la TEVA-anoj, kiuj deziras ke la propra adreso de elektronika poŝto aperu en **ESPERANTISTA VEGETARANO** kaj en la **LETERO**, ni petas sendi ĝin al la Sekretariejo.

PS Bonvolu noti ke la litero -ikso-(x) ne apartenas al nia lingvo, kaj ke L. L. Zamenhof en la Fundamento rimarkas ke tiuj, kiuj ne posedas la literojn ĉ, ĝ, ĥ, ĵ, ŝ, ŭ, povas, anstataŭ ili, uzi ch, gh, hh, jh, sh, u.

ASOCIAJ INFORMOJ

Aktualajn asociajn informojn TEVA donas al la Membroj per la Organo, t.e. la LETERO de Esperantista Vegetarano, kiu aperas tiom ofte en la jaro kiom estas novaĵoj, kaj la kajero ESPERANTISTA VEGETARANO, kiu profundigas la asociajn temojn kaj aperas unu fojon en la jaro.

La kajeron kaj la LETERO-n la Ĝenerala Sekretariejo sendas rekte al la Membroj.

Ĉiu Membro donas jare libervolan mondonacon al la Landa Rezentanto. La Rezentanto sendas je la fino de la jaro la sumon de la mondonacoj al:

konto "teva-h ĉe UEA - Nieuwe Binnenweg 176 - 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, Nederland, aŭ al la sekva konto de la nuntempa Kasisto:

"C. Fettes - IEO5 AIBK 932256 12224288 AIBKIE2D

kun letero al la Ĝenerala Sekretariejo ĉe:

S-ino Lilia FABRETTO - Via Pietro Cartoni 12/12 - IT - 00152 Roma, Italia.

Per la ĉi-supra letero la Rezentanto detalas la mondonacojn kun la nomoj kaj la adresoj de la Membroj. En landoj, kie TEVA ne havas Rezentanton, la Membroj sendas la mondonacojn al:

- konto "teva-h" ĉe UEA - Nieuwe Binnenweg 176 - 3015 BJ Rotterdam, Nederlando, Nederland
- aŭ al la konto de la nuntempa Kasisto:
"C. Fettes - IEO5 AIBK 932256 12224288 AIBKIE2D"

La aktualaj nomoj kaj adresoj de la Landaj Rezentantoj aperas en la lasta numero de la LETERO aŭ de la jara kajero ESPERANTISTA VEGETARANO.

Kotizoj

Sur la antaŭaj paĝoj aperas informoj pri la pagmanieroj de la jaraj libervolaj mondonacoj al TEVA, kaj ni aldonas ĉi-tie pliajn detalojn pri la poŝtaj kontoj en kelkaj landoj:

- BELGUJO** la Membroj en Belgujo sendas la kotizon al la Re-
prezentanto Inĝ ZAIT Olimpia - Av. des Loisirs 4, boîte
19 - BE - 1140 EVERE-Bruxelles, Belgique kaj la numero de
la poŝta konto estas: 000-0383796-64.
- BRITUJO** la Membroj en Britujo sendas la kotizon per ĉeko al
Reprezentanto S-ro William SIMCOCK, Clayton House,
GB-BUTTERTON, Leek, Staffs, ST13 7SR, United
Kingdom.
- DANLANDO** la Membroj en Danlando sendas la kotizon al la Re-
prezentanto S-ro Ejnar HJORTH - Christiansga-
de 38-2 - DK - 9000 Aalborg, Danmark kaj la
numero de la poŝta konto estas: 189 88 92.
- HISPANUJO** la Membroj en Hispanujo sendas la kotizon al konto
"teva-h" ĉe UEA
- IRLANDO** la Membroj en Irlando sendas la kotizon al Reprezentanto
S-ro Christopher Fettes - Bloomville, IE - Cloneygowan,
Tullamore, Co. Offaly, kaj la konto estas la jena: "C. Fettes
- IEO5 AIBK932256 12224288 AIBKIE2D".
- ITALUJO** la Membroj en Italujo sendas la kotizon al la Re-
prezentanto S-ino Lilia FABRETTO - Via Pietro
Cartoni 12/12 - IT - 00152 Roma, Italia kaj la
numero de la poŝta konto estas: 11804002.
- NEDERLANDO** la Membroj en Nederlando sendas la kotizon al
konto "teva-h" ĉe UEA.
- NORVEGUJO** la Membroj en Norvegujo sendas la kotizon al la
Reprezentanto S-ro Kjell Peder HOFF - Øyav 64
A - NO - 1900 Fetsund, Norge kaj la numero de
la poŝta konto estas: 0534-3978350.
- SVEDUJO** la Membroj en Svedujo sendas la kotizon al konto
"teva-h" ĉe UEA.
- SVISLANDO** la Membroj en Svislando sendas la kotizon
al la konto "teva-h" ĉe UEA.

Ni petas al la Landaj Reprezentantoj, kiuj malfermis novan ĝirkonton ĉe la poŝto por ricevi la kotizojn de la Membroj, sendi al ni la numeron de la konto, por ke ni povu informi ĉiujn interesatojn.

ESTRARO DE TEVA

2006

PREZIDANTO kaj

NUNTEMPA KASISTO

Christopher FETTES, Bloomville, IE - Cloneygowan, Tullamore, Co. Offaly

Ireland

VICPREZIDANTO

William SIMCOCK, Clayton House, GB - BUTTERTON, LEEK, Staffs, ST13 7SR

United Kingdom

ĜENERALA SEKRETARIO

Lilia FABRETTO, Via Pietro Cartoni 12/12, IT - 00152 ROMA

Italia

LANDAJ REPRESENTANTOJ

ALBANIO	S-anino Rita PERMETI, Rruga 4 Deshmoret P. 11/B, Shk. 5, Ap. 20, AL - TIRANE,	Albania
ARGENTINO	Roberto SARTOR, Beruti 2792 3° 9 - C 1425 BBF BUENOS AIRES,	Argentina
AŬSTRALIO	Bob FELBY, 6 Dorset Street, AU - SEMAPHORE PARK,	S.A. 5019, Australia
BELGIO	Inĝ. Olimpia ZAIT, Av. des Loisirs 4, boîte 19 - BE-1140 EVERE-BRUXELLES	Belgique - Belgio
BRAZILIO	Onei BORACINI, Rua Natália Tebar 199, São Francisco - BR - 15086-140 - SÃO JOSÉ DO RIO PRETO - SP -	Brasil
BRITIO	William SIMCOCK, Clayton House, GB - BUTTERTON, LEEK, Staffs, ST13 7SR,	United Kingdom
ĈINIO	D-ro Liang JI LIU, 20 Yang Ming Lu, Jiangxi Zhongyi Xueyuan, CN - 330006 NANCHANG,	Zhongguo
DANLANDO	Ejnar HJORTH, Christiansgade 38, 2, DK - 9000 AALBORG,	Danmark
FRANCIO	Inĝ Pascal ROUILLARD, 35 Rue Georges Bizet, FR - 13200 ARLES,	France
HUNGARIO	József NÉMETH, HU - 8531 - IHÁSZ - Fő u. 41/5,	Magyarország
IRANO	S. N. MOZAFARI, Sanduq-E-Posti 5935, IR - 11365 TEHRAN,	Iran
IRLANDO	Christopher FETTES, Bloomville, IE - Cloneygowan, Tullamore, Co. Offaly,	Ireland
ISRAELO	Mark STEINBERG, P. O. K. 144, IL - 26101 HAJFA - Kirjath Haim,	Israel
ITALIO	S-anino Lilia FABRETTO, Via Pietro Cartoni, 12/12, IT - 00152 ROMA,	Italia
JAPANIO	Yoshinori SAITO, Honcho 1-16-7, Kawaguchi - JP - SAITAMA, 332-0012,	Nippon
KAMERUNIO	S-anino Chamberline NGUEFACK ZEDONG - BP 7407 - CM - DOUALA,	Republique du Cameroun
KANADO	Normand FLEURY, 6358 rue de Bordeaux, H2g 2R8 MONTREAL, Québec,	Canada
KOLOMBIO	Prof. Rafael MEJIA, Calle 18A N° 55-96 Apartamento 111-C, Canãverales V, CO CALI (V),	Colombia
KOREO	Jong-ĝin GIM, Chon-AN, Saseoham 5, CHON-AN SI 330-600,	Chung-nam Korea
KOSTARIKO	Danilo OVIEDO QUESADA - Apartado 011 - La Cuesta - CR - 8251 CORREDORES,	Costarica
KROATIO	S-anino Zlata NANIC', Grada Vukovara 238, HR - 10000 ZAGREB,	Republika Hrvatska
KUBO	Josè Luis MONTES DE OCA, Calle José M. Sanchez 70 - CU - 53000 SANTO DOMINGO - Villa Clara,	Cuba
NEDERLANDO	Rob MOERBEEK, Zwaansmeerstraat 48, NL - 1946 AE BEVERWIJK,	Nederland
NORVEGIO	Kjell Peder HOFF, Kardemomone - Solvegen 12 B - NO - 2005 RALINGEN,	Norge
PAKISTANO	S.A. FARANI, House n-ro K-18, Machine Mohalla N-ro 3, PK - JHELUM,	Pakistan
PERUO	Inĝ P. F. CAMACHO DAZA, El Boulevard 131 Monterrico, PE - LIMA 33,	Peru
POLLANDO	Prof. Antoni Pawel TABACKI - ul. Mikusińskiego 30 m 40 - PL - 40-146 KATOWICE 33,	Polska
PORTUGALIO	PORTUGALA ESPERANTO-ASOCIO, Rua Dr. Joao Couto 6 r/CA, PT - 1500 LISBOA,	Portugal
RUSIO	Inĝ Bronislav ĈUPIN - a.k. 6065 - RU - 426006 LJEVSK,	Rossija
SUD-AFRIKO	D-ro J.P. HAMMES, Posbus 40225, Arcadia, 0007 PRETORIA,	Suid Afrika
SVEDIO	Jarl HAMMARBERG, Illergatan 1 SE - 42671 VÄSTRA FRÖLUNDA	Sverige
SVISLANDO	S-anino Elisabeth EISENEGGER, Saumackerstrasse 59 - CH - 8032 ZÜRICH,	Helvetia
TAJLANDO	Pho THAMKHAJADPAIKUM, 42 Ari Samphan 5, Rama 6 rd, Phya Thai, TH - 10400 BANGKOK,	Thailand
TOGO	GBEGLO Koffi, B.P. 13169, TG - NYEKONAKPOE, LOMÉ,	Togo
TUNIZIO	Abderrazak TABKA, Cité Riadh 4ème Log.No. 12 Rue 5125 TN - 4023 SOUSSE-ERRIADH,	Rep. Tunisienne
URUGVAJO	S-anino Sandra BURGUES ROCA, Dr. M. C. Martinez 2825, C. Garibaldi - UY - 11800 MONTEVIDEO	Uruguay
VENEZUELO	David G. VALECILLOS, Calle 79 - 3 C-72, VE - MARACAIBO,	4002 Venezuela
VJETNAMO	Nguyễn Đình LONG, 50/6/9 Nguyễn Đình Chiểu, P.3, Quận Phú Nhuận, THANH PHO HO CHI MINH,	Việt Nam

Ĝenerala Sekretariejo de:

TUTMONDA ESPERANTISTA VEGETARANA ASOCIO (TEVA), ĉe:
Lilia FABRETTO, Via Pietro Cartoni 12/12, IT - 00152 ROMA, Italia

Faksimilo: 06 58202232

Elektronika Poŝto: centro.stampa@tiscalinet.it

